



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 4

Aprilo, 2017

Karaj niaj Legantoj, je via atento nur estas proponata unu el plaj gravaj numeroj de nia bulteno, ĉar ĝi enhavas multajn utilajn materialojn por informi eksterulojn pri nia ŝatata lingvo. Ne ofte ni donas materialojn en aliaj (krom E-o) lingvoj. Sed hodiaŭ ni DEVAS tion fari. Bv uzi informaĵojn senhezite je la prospero de nia kara ILingvo! Ĉefa artikolo estas bazita sur la anglalingva blogo de Olga Kerzjuk, kuratoro de E-libraro de La Brita Biblioteko (Londono). Samideane, La Redaktoro

La Majstro Mortis! –de Olga Kerzjuk



L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, mortis en Varsovio la 14an de Aprilo 1917. Varsovio estis tiutempe okupata de germana militistaro, ĉar la milito en Eŭropo daŭre furiozis kaj la rusa imperio jam estis en flamo de la t. n. Februara Revolucio.

“Normally the funeral of Ludovic Zamenhof would have been attended by at least representatives of the Esperanto

Movement from most European countries; war made this impossible”, notas Marjorie Boulton en sia libro *Zamenhof, Creator of Esperanto*.

Jen kiel ŝi priskribas la funebran procesion:

“At three o’clock on April 16th the funeral procession set out from 41 Krolewska Street, with those members of the family who were able to come, the Warsaw Esperantists and many of Zamenhof’s poor patients. Foreign Esperantists were represented by Major Neubarth and one other German. As slow procession passed through the Saxon Square and along Wierzbowa Street, Bielanska Street, Nalewki Street, Dzika Street and Gesia Street to Okopowa Street and the Jewish cemetery, the slow black serpent grew longer and longer.”

Dum la funebrado pola poeto kaj esperantisto Leo Belmont parolis varme pri Zamenhof pole kaj la prezidanto de la Pola Esperanto-Societo, poeto kaj tradukisto Antono Grabowski omaĝis al la plej granda E-persono en Esperanto.

La novaĵo pri la morto de Zamenhof disvastiĝis tutmonde. Dum la funebra ceremonio en Londono en Harecourt preĝejo la 6an de Majo 1917, belga esperantisto Paul Blaise, edziĝita al la brita esperantistino Margaret Jones kaj vivanta en Anglio kiel rifuĝinto, voĉlegis dume ne-eldonitan tradukon de Zamenhof el Jesaja.

La eksterordinara vivo de Zamenhof, lia lingvo kaj liaj ideoj altiris kaj altiros atenton de multoj, nun kaj en la estonteco. En 2007 la sesa eldono de la biografio de Zamenhof (unue eldonita en 1920) fare de eminenta svisa esperantisto, unua historiisto de E-movado Edmond Privat

estis aperigita de UEA, bazita en Roterdamo. Je tiu tago, 100 jaroj post la morto de Zamenhof, esperantistoj el Albanio al Zimbabvo kaj multaj ne-esperantistoj memoras lian vivon kaj atingojn. Zamenhofa testamento de lia poemo “La Vojo” (The Road), skribita en 1896, estas ankoraŭ resonata en iliaj memoroj:

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.
L’ espero, l’ obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.*

*Straight forward, with courage, not veering nor stopping
Pursue we this Way of our own:
Ne’er faileth the water, by dropping and dropping,
To wear through a mountain of stone:
For Hope, and Persistence, and Patience together
Are watchwords in all kinds of weather;
So, step after step – such is ever the story –
We’ll come to the goal of our glory.*

*(Translated by D.O.S. Lowell, Star in a Night Sky.
An Anthology of Esperanto Literature, London, 2012).*

Reeĥe al la Majstra morto, fama hungara E-poeto Julio Baghy verkis poemon, titolo de kiu estas uzata por ĉi artikolo. Dum tiu ĉi evento li (poeto) estis malliberigita fare de moskovitoj en Siberio, urbeto Nikolsk-Ussurisk.

✿ La Majstro Mortis! ✿

<i>Ne estis mi tie, preĝante plorpie, katenis min sklave Siberio. La famon ne brue, nur poste, malfrue, simile al eĥo de mortkrio mallonga sciigo alportis: “La Majstro mortis!”</i>	<i>Sed scias mi sente, ke oni sensente plezurojn pelante babiladis, eĉ kiam plorante la ĉerkon portante amaso funebra trapaŝadis. Mallonga sciigo alportis: “La Majstro mortis!”</i>	<i>Por ili, jen homo, eĉ malpli — nur nomo sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko... Por ni, funebrantoj, por pacbatalantoj, ĝi gardas kreinton de mondverko. Mallonga sciigo alportis: “La Majstro mortis!”</i>
--	--	--

Pri la lasta E-kunsido *de Les Kordylewski*



La lasta kunveno de nia Societo okazis en la nova loko: la studĉambro de la Harold Washington Public Library en Ŝikago, je la 6a etaĝo de tiu impona domo troviĝanta en la centro de la urbo. Nia sindona membro Hanso aranĝis ĝin lastmomente, post kiam ni eksciis ke la ĝisnuna loko de niaj kunvenoj ne plu estos uzebla. Post jaroj de ĉiumonata

kunvenado tie, ni ŝuldas multajn varmajn dankojn al Viktoro-redaktoro, kiu afable gastigadis nin en Ŝuista Placo. Multajn dankojn ankaŭ al Hanso, ĉar la nova loko aperas esti tre konvena. Ni decidis, ke ni penos okazadi niajn estontajn kunvenojn tie. Tamen ne ĉiuj estas feliĉaj pro la ŝanĝo de la kunvenejo. Kelkaj niaj membroj ne alvenis, konsiderante ke la urbocentro de Ŝikago ne estas sufiĉe sekura dum la vesperaj horoj. La plej kuraĝaj evidentiĝis ses viroj, kiuj senprobleme atingis la kunvenejon, kaj poste same sekure forlasis ĝin. Bedaŭrinde Ŝikago tradicie havas la reputacion de la krimoplena urbo. Tia opinio eĉ laste estis emfazita de nia nova, respektinda Prezidento de Usono, s-ro Trump.

Nian kunvenon partoprenis Viktoro, Hanso, Ted, Lance kaj la raportanto. Surprize, aperis tute novbakita samideano, alban-devena Saimir, kiu havis la okazon unuafoje konversacii en Esperanto kun ni, kaj ĝuis tion multe. Li havis multajn demandojn pri nia lingvo kaj movado, kaj ni ĉiuj ĝojis klarigi la detalojn. Nin akiris Saimir pere de Meetup, kie niaj kunvenoj estas anoncataj al la ĝenerala publiko: <https://www.meetup.com/Esperanto-Chicago/>. Ankaŭ por Lance ĉi renkonto estas la dua buŝa konversacio E-e: antaŭ unu tago li parolis IL-on en la Zamenhof-Graboski-a maniero (ĉu vi konas historian pri la unua E-konversacio?).



Dum la kunveno ni vigle diskutis la planojn de la agado de nia grupo por ĉi jaro. En aprilo kaj majo ni volas kunveni refoje en la Biblioteko, dum Junio okazos la pikniko, probable sur la bela Ŝikaga duoninsulo "The Point" en la universitata kvartalo Hyde Park.

Mi esperis, ke dum nia kunveno ni ĝuos rigardi la kolekton de E-libroj. En pasinteco oni arigis ilin danke al nia antaŭa membro Bill McElwain, kiu estis dungito de la Biblioteko, sed jam mortis antaŭ jaroj. Evidente, ĉar neniu plu zorgis pri la kolekto, mi kun bedaŭro konstatis nun, ke la Biblioteko forigis siajn E-librojn, lernilojn, vortarojn. En la fremdlingva sekcio restis nur malplenaj bretoj, alfabeto inter la nederlanda kaj estona kolektoj. Kvankam la skriba Esperanto mankas tie, ni plenigis tiun bedaŭrindan vakuon en la Biblioteko pere de nia parola lingvo.

De la E-mondo:

Okaze de la 100a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, "Le Figaro", grava franca gazeto, intervjuis Didier Loison, vicprezidanton de Espéranto-France, kaj Bruno Flochon, respondulon de la Strasburga Klubo, ankaŭ vicprezidanton de Espéranto-France, pri situacio de la internacia lingvo, aparte en Francio.

– *Esperanto Bourg-en-Bresse*

Kadre de la festado de la Zamenhof-Jaro, la unua numero de la redaktoroj Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova estas libere elŝutebla de la retejo revuoesperanto.org dum la tuta aprilo.

– *UEA*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

NOVA LOKO

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko laŭ en la adreso: 400 S. State St., Ŝikago, IL ~ **Bonvenon!**

25an de Aprilo – Zamenhofa Jaro, Prelegas Prez. D-ro Kordylewski

23an de Majo – 500-Jariĝo de Reformacio, Gvidas Hanso

(18an) 25an de Junio – Tradicia Somera Pikniko

25-an de Julio – pri Kaliforniaj Vitejoj Rakontas Araneo

22-an de Aŭgusto – UK en Seulo per Okuloj de S-no Leszek